

amnestio internacia

Konspiro de espero



Miloj da homoj estas en karceroj pro siaj konvinkoj, multaj el ili nek formale akuzitaj nek procesitaj. Oftas torturo kaj mortpuno. En multaj landoj viroj, virinoj kaj infanoj 'malaperas' post formala aresto. Ankorau aliajn oni mortigas sen eĉ ŝajnigo de jura proceso, elektitajn kaj murditajn de la ŝtato kaj de ĝiaj poragantoj.

Tiuj fifaroj, okazantaj en landoj de plej diversaj ideologioj, postulas multnacionan reagon. La protekto de la homaj rajtoj estas universala respondeco, transportanta ĉiujn limojn de nacieco, raso kaj ideologio. Tia estas la fundamenta kredo sur kiu baziĝas la laboro de 'Amnesty International'.

KIO ESTAS 'AMNESTY INTERNATIONAL'?

'Amnesty International' estas sendependa mondvasta organizaĵo. Ĝia specifa rolo estas la internacia respekto de la homaj rajtoj. Ĝia agado fokusiĝas ekskluzive ĉe la malliberuloj:

- Ĝi alstrebas la **liberigon** de la **prokonsciencaj arestitoj**. Tiuj estas homoj arestitaj ie ajn pro sia kredo, haŭtkoloro, sekso, etna deveno, lingvo aŭ religio, kondiĉe ke ili nek uzis nek rekomendis perforton.
- Ĝi laboras por **justa kaj baldaŭa proceso** por ĉiuj **prokonsciencaj arestitoj** kaj favore al la personoj arestitaj sen formala akuzo aŭ proceso.
- Ĝi kontraŭstaras la **mortpunon, torturon**, kaj aliajn kruelajn, nehumanajn aŭ maldignajn traktojn aŭ punojn de senescepte ĉiuj malliberuloj.

KIU APOGAS 'AMNESTY INTERNATIONAL'?

'Amnesty International' havas mondvastan aktivan membraron. Ĝi havas pli ol 500.000



membrojn, abonantojn kaj subtenantojn en pli ol 150 landoj. La movado estas alirebla por ĉiu, kiu favoras ĝiajn celojn. La membroj estas el ĉiuj sociaj grupoj, posedas tre diversajn opiniojn, kaj estas invititaj partopreni la aktivecojn de ĝiaj multaj agadoj.

Tuj kiam 'Amnesty International' informiĝas pri politika aresto, aŭ pri homo minacata de torturo aŭ ekzekuto, ĝi unue klopodas konstati la faktojn. En la Internacia Sekretariato niaj esploristoj kolektas kaj kontrolas ĉiun haveblan informon por atingi profilon de la kaptitoj kaj la cirkonstancojn de ilia aresto. Tiam komenciĝas la agado por ilin helpi.

KUN KIAJ REZULTOJ?

La poŝtkartoj, telegramoj kaj pakaĵoj tamen penetras. Revenas respondoj, plurokaze elportitaj kaŝe, aŭ preter la flughavena cenzuro.

Kiam, en orienteŭropa lando, juna jurstudento ricevis trijaran karcerpunon, arestita ĉar li kolektis subskribojn por la liberigo de politikaj arestitoj, lia patro dum la sama semajno skribis al 'Amnesty International' jene:

☪ *Mi spertis, kia beno estas via alvoko, ĉar vi levis la voĉon defende al mia filo... 'Amnesty International' estas hela lumo por nia tempo, precipe por tiuj, sur kies okulojn falis*

mallumo kiam fermiĝis malantaŭ ili la karcera pordo. Per via nobla laboro, tiu lumo brilas sur la ĉiam pli vasta rondo de la ĝin bezonantoj.

Inter multaj aliaj viktimoj estis latin-amerika instruisto. Dum ili lin torturejon kun la policanoj telefone ligis la torturejon kun la hejmo de la torturato, tiel devigante lian edzinon aŭdi lin hurli. Dum tiu suferego ŝi mortis pro korinfarkto. Al la travivinta torturito oni fine permesis ekziliĝon kun la infanoj. Li diris al ni:

*Ĉi murdis mian edzinon.
Ĉi murdis ankaŭ min; sed vi intervenis kaj savis mian vivon.*

Kiam ni eklaboras pri ilia kazo, kelkaj arestitoj tre baldaŭ liberiĝas; aliajn oni liberiĝas en ĝenerala amnestio; aliajn nur post la tuta tempo de karcera kondamno. 'Amnesty International' tamen ne atribuas al si iun ajn liberigon, eĉ se ĝi jam esploris la kazon aŭ kampanjis por tiu arestito. Tamen, se 'Amnesty International' akceptas kampanji pri iu kazo, ĝi de tiam ne ĉesas klopori.

Nia movado do estas kvazaŭ do savosano, 'konspiro de espero', alirebla por ĉiu, kiu volas labori por la homa digno. Ĝi jam pruvis, ke la ordinara homoj povas kunlabori indiferece el politika vidpunkto, kun la celo ĉesigi la ekscesojn de la tiraneco.

'AMNESTY INTERNATIONAL' TRA LA MONDO



La plimulto de la membroj kaj apogantoj de 'Amnesty International' organiziĝas en malgrandaj lokaj grupoj. Ekzistas nun pli ol 3.000 grupoj en Afriko, Azio, Ameriko, Eŭropo kaj Mezoriento. Unika trajto de tiuj grupoj, emfazanta la principon de *internacia* laboro por la homaj rajtoj, estas la fakto, ke ĉiu grupo laboras por arestitoj ĉiam el alia lando ol la sia. Kutime la grupoj laboras por po du arestitoj, geografie kaj politike ekvilibritaj por certigi senpartiecon. Neniu grupo aŭ membro estas petita informi pri la propra lando, nek respondecas pri agadoj aŭ deklaroj de la internacia organizaĵo koncerne sian landon.

'Amnesty International' estas demokratie regata. En pli ol 40 landoj la membroj kaj

Kiel oni aliĝas al

'Amnesty International'?


La aliĝo al 'Amnesty International' donas aliron al novaj, grandparte ĝis nun ne publikigitaj, informoj pri malrespekto al la homaj rajtoj; informoj tutmondaj, sendependaj kaj senpartiaj. Aliĝinte al 'Amnesty International' vi ricevos ankaŭ informojn pri la maniero helpi tiujn, kiuj viktimitiĝis.

La Novaĵletero de 'Amnesty International'



Tiu monata bulteno regule ĝisdatigas viajn informojn pri la laboro de 'Amnesty International', per raportoj de esplordelegacioj, detaloj pri politikaj arestoj, fidindaj raportoj pri torturetoj kaj ekzekutoj. Verkita - sen politika tendenco - por la tutmondaj aktivuloj pri homaj rajtoj, ĝi estas vaste konsultata de ĵurnalistoj, studentoj, politikaj gvidantoj, kuracistoj, juristoj, kaj aliaj profesiuloj.

La Jarraporto de 'Amnesty International'



Tiu jarraporto laŭlande trarigardas la tutmondan laboron de 'Amnesty International' kontraŭ politika enkarcerigo, torturo kaj mortpuno. Laŭkontinente dividita, la raportoj kutime traktas minimume 100 landojn. Kredeble ĝi estas la plej vaste legata, kaj plej influa, el la multaj raportoj, kiujn 'Amnesty International' publikigas ĉiujare.

Jarabono por la Novaĵletero: £7.00 (US \$12)
Abono por la du eldonaĵoj: £18.00 (US \$35)

ĉe:

Amnesty International Publications
1 Easton Street, London WC1X 8DJ, Britujo
aŭ ĉe la sekcio por via lando.

la grupoj organiziĝas en landaj sekcioj. Per tiuj la membroj decidas la agadlinion de la movado kies kostojn ili pagas. La gravajn decidojn pri la agadlinio do faras la Internacia Konsilio, kiu konsistas el reprezentantoj de ĉiuj sekcioj. Ili elektas Internacian Plenumkomitaton, kiu efektiviĝas la decidojn kaj kontrolas la rutinan funkciadon de la Internacia Sekretariato.

Se vi deziras aliĝi al loka grupo aŭ al la sekcio de via lando, aŭ fariĝi unuopa abonanto, unue kontrolu ĉu 'Amnesty International' aperas en via loka telefonlibro. Se ne, kontaktu nin ĉe:



**amnesty
international**

Amnestio Internacia
Internacia Sekretariato
1 Easton Street, London WC1X 8DJ, Britujo
Telefono: 01-833 1771 Telegramadreso:
Amnesty London WC1 Telekso: 28502

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

ANTAŬKONSIDEROJ

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberigon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinarnaj homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elekta vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, Nun, LA ĜENERALA ASEMBLEO proklamas

TIUN ĈI UNIVERSALAN DEKLARACION DE HOMAJ RAJTOJ kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaskaj liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racian kaj konsciencan, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferenco, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Pli, neniu diferenco estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, nenkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, ne-sinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4

Neniu estu tenata en sklavenco aŭ servuteco; sklavenco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5

Neniu suferu torturon aŭ kruecan, nehuman aŭ nedignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn lastigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efektivan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝo.

Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prajugo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11

(1) Ĉiu akuzita pro punebila faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

(2) Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis punebilan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikibla en la tempo, kiam la punebila faro estis plenumita.

Artikolo 12

Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13

(1) Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.

(2) Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Artikolo 14

(1) Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.

(2) Tiu rajto ne estas alvokibla en kazoj de persekutoj akuzoj malfalse levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15

(1) Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.

(2) Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

Artikolo 16

(1) Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen la ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne ekedziĝon.

(2) Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.

(3) La familio estas la natura kaj fundamenta grupuno de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.

Artikolo 17

(1) Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociigo kun aliaj.

(2) Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto.

Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimo; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20

(1) Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociigo.

(2) Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21

(1) Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.

(2) Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.

(3) La voĉo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu voĉo estu esprimita per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaĵaj proceduroj.

Artikolo 22

Ĉiu, kiel membro de la socio, havas rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por la digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23

(1) Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.

(2) Ĉiu, sen la ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.

(3) Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenson, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementon, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.

(4) Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24

Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racian limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25

(1) Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵoj, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

(2) Patrinedo kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26

(1) Ĉiu havas rajton je edukigo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadio. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

(2) Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasoj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservado de paco.

(3) Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27

(1) Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturalan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciancon progreson kaj ĝajn fruktojn.

(2) Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktadoj, kiujn li aŭtoris.

Artikolo 28

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29

(1) Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.

(2) En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

(3) Tiu ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en uzo okazoj efektiveblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30

Neniu en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn Ŝtato, grupo aŭ persono kel ajn rajtas entrepreni lan ajn agadon aŭ plenumi lan ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj.